



8-6-1974

CGC Nº

00406 504/1000-06

Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA – DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal, 31 – AP. 73

Telefone 4-8033

11.100 – Santos (SP)

SECRETARIA

Caixa Postal 07 – 1182

Telefone 242-5211

70.000 – Brasília (DF)

FEVEREIRO DE 1980

ÓRGÃO OFICIAL DO BKE

BOLETIM Nº 52

Redação: MARIA ALMADA

UEA EN BUDAPEŬTO-HUNGARIO

La Universala Esperanto-Asocio ĉiujare plifortigas kaj kreskas, dank' al siaj progresemaĵoj gvidantoj.

La estraro decidis agadi ekster la Centra Oficejo, kiu troviĝas, kiel sciata, en Roterdamo (Nederlando).

"Ni tre konscias pri la neceso ekspluati aparte favorajn surlokajn kondiĉojn en diversaj mondpartoj, se ili prezentiĝas. Pro tio ni malfermis Grafikan Centron en Antverpeno, tiel utiligante aparte efikan nukleon de surloka talento kaj profitante la favorajn leĝojn de Belgio rilate neregistarajn organizojn. Similaj konsideroj kondukis al starigo de la novjorka oficejo", diris D-ro Tonkin en la al ni sendita letero de la 2-a de januaro 1980.

Pro la samaj faktoj la estraro de UEA starigis en Hungario, oficejon por Esperanto-eldonado. "Budapeŝto ankaŭ fariĝis la centro de la agado faka per Esperanto". "Certe starigo de tiu oficejo ebligas al ni utiligi iom sisteme la talentojn de niaj hungaraj kunlaborantoj kaj signife plivastigi niajn eldonajn aktivecojn", skribis D-ro Tonkin.

En la novbakita centro estas eldonita la Plena analiza gramatiko de Esperanto de Kalocsay kaj Waringhien en tiu ĉi jaro.

- x - x - x - x - x - x -

1-A KONGRESO DE BKE

Okazos en Juiz de Fora (MG), kiel

jam informite, de la 3-a ĝis la 6-a de aprilo 1980, en la Rektorejo de la Federacia Universitato de Juiz de Fora.

La eventon patronos la rektoro, d-ro Sabastião de Almeida Paiva. La celo estas disvastigi la internacian lingvon, ĉe la studentoj de la Universitato, fortiĝi la jam ekzistantan kurson de Esperanto, gvidatan de la mag. José Passini.

La kongreson Partoprenas grandnombre niaj profesoroj kaj Kursgvidantoj, kio ebligas pritrakti la futuron de nia movado en Brazilo.

Ideoj, proponoj bonvenas. Okazos debatoj pri la ĝis nuna agado ĉe la fakultatoj, lernejoj kaj Esperanto-organizaĵoj kaj interŝanĝoj de novaj ideoj pri la estonteco.

Dum la unua Nodorianta Renkontiĝo de Esperanto en Natal (RN), organizita de BEL, en la pasinta jaro, nia vicprezidanto Francisco Alves Mata proponis, ke Esperanto estu metita en ekzamenoj por eniro en Fakultatoj, kiel elektelebla lingvo flanke de fremdaj (franca, hispana, angla, ktp.). Tiel la gestudentoj havos eblecon elekti Esperanton anstataŭ la aliajn lingvojn.

La "Sociedade Bauruense de Esperanto" apogis la ideon kaj la prezidanto Euclides G. de Carvalho proponas, ke oni petu al Federacia Konsilantaro pri Edukado permesdecidon. Jen interesa temo por ampleksa debato.

Okazos ankaŭ debatoj pri la interrilatoj de organizaĵoj, kiuj konsistigas BKE,

kaj kunlaboro de ni ĉiuj. La rajtoj kaj devoj de niaj vicprezidantoj same estos prizorgataj. Raporto pri la celo kaj agado de BKE, krom aliaj temoj.

Estas nepre necese ĉeesti la kongreson kaj decidi pri farendaj taskoj. Multaj personoj jam kunlaboras kontentige kaj nia movado pli kaj pli kreskas, sed ni bezonas, ke la neaktivuloj kvankam kapablaj gesamideanoj eklaboru ankaŭ.

Ĉar okazos en Argentino la 1-a Tut' Amerika Kongreso, ni ne havos Seminarion de Esperanto, kiun kutime prizorgas KKE. Pro tio eluzu ni la kongreson de BKE en Juiz de Fora, ĉarma kaj gastema urbo sur alteco de 679 metroj. La mezgranda temperaturo estas 19 c, do agrabla klimato. La urbo havas interesajn vidindaĵojn kaj la kongresanoj pasigos la Pasokon inter la esperantistoj. Ni forte kredas, ke nia movado fortiĝos kaj kunlaborante, la 66-a UK en la venonta jaro brile sukcesos.

Ni petas niajn gesamideanojn kaj geamikojn aperi en Juiz de Fora, ĉar la organizado de la 66-a UK ne dependas nur de la kongresa Komisiono, sed de ni ĉiuj. Neniam estis tiel grava kaj necesa la kunlaborado de nia anaro kiel nun.

En nia lando aperos reprezentantoj el la tuta mondo kaj nia devo estas elmontri la faman brazilan gastemecon. Dum la kongreso de BKE okazos klarigoj kaj interŝanĝo de ideoj pri la tasko farenda por la UK en la venonta jaro.

La senpagaj tranokteblecoj estas limigitaj en Juiz de Fora, jen kial ni petas niajn gekongresanojn, kiuj deziras senpagan dormadon skribi al la sekretario Reinaldo Zaghetto, rua Acre, 340 - Mundo Novo, CEP. 36:100 - Juiz de Fora (MG).

- x - x - x - x - x - x -

GAZETOJ RICEVITAJ

Kiel kutime ni ricevis la jenajn periodaĵojn kaj dankas al sendintoj: "Diário Popular", "Gazeta da Bahia", "Folha de São Caetano", "Jornal de Jundiá", "Correio Fraternal do ABC", Sekso kaj Egaleco, "Folha da Tarde", "Tribuna de Lavras", Bulteno de A.P.E. - Recife, Paraná Informilo, "Diário da Tarde", Esperanto-Lumo. "O Alquimista", "Folha de Caça-

pava", "O NO'SSO", "Meninão Santista", "Diário do Cacau", "Bulteno pri ŝako" kaj "O Corujão".

- x - x - x - x - x - x -

TAUBATÉ (SP) - Krom dimanĉe, la "Rádio Difusora de Taubaté" pere de mezaj ondoj, 570 KHZ, kaj kurtaj ondoj de 1925 KHZ, aŭdebla en multaj urboj, disradias ĉiutage informojn pri Esperanto en la programo J. BONANI - ANO 2000 de la 7-a - 30 minutoj ĝis la 8-a - 30 minutoj matene. Iformis nin nia s-ano kaj vicprezidanto Silva Velho.

BAURU (SP) - La anaro de la Baurua Esperanto-Asocio estas gratulinda; ili senĉese klopodas enkonduki la internacian lingvon en lernejojn kaj fakultatojn. Sammaniere ili laboras por havigi monon kaj aĉeti sidejon. Ili jam kolektis preskaŭ Cr\$ 100.000,00. La prezidanto de la societo, s-ano Euclides G. Carvalho, sentas la neceson de ĉies kunlaborado. Li substrekis en sia letero, ke "unuigo estas forto", kaj li pravas. Se ni kunlaboras kun ĉiuj estos pli facile labori kaj atingi sukceson.

Ni forte esperas, ke niaj karaj bauruanoj pere de sia ĉeesto riĉigos nian kongreson en Juiz de Fora (MG). Amike ni atendas vin. Ni kune decidis pro la farendaj taskoj rilate la 66-an UK en Brazilja.

KULTURA KOOPERATIVO DE ESPERANTISTOJ - Rio de Janeiro (RJ) - Ĉiujare KKE okazigas Seminarion de Esperanto. La pasintan jaron ĝi okazigis en Uberaba (MG) kun granda sukceso. Ĉijare tamen KKE ne povas okazigi sian kutiman Seminarion, ĉar ĝi kunlaboras kun la Tut-Amerika Kongreso en Argentino. La prezidanto de KKE, pretas kunlabori kun BKE, volonte, li donacis la buston de Zamenhof, kiu estos starigita en Juiz de Fora. D-ro Braz Cosenza komprenis la nepre necesan devon de ni ĉiuj, unuigi niajn fortojn en nia movado kaj bone kunlaboras.

KKE certe starigos librovendadon en Juiz de Fora, kie ĉiuj povos akiri bonegajn verkojn de bone konataj aŭtoroj kaj tradukintoj de nia literaturo.

Ni dankas al nia vicprezidanto la komprenemon.

Kiu deziras aliĝi al la Tut-Amerika Kongreso de Esperanto turnu sin al KKE, Avenida 13 de Maio, 47 - Sobreloja 208, CEP 20.000 - Rio de Janeiro (RJ) aŭ utiligante la poŝtkeston 1887 - Rio de Janeiro.

La temo de la kongreso estas: "Análizo de la lingvaj aspektoj en la Amerikaj Ŝtatoj", kiel kontribuo al la komuna programo de UEA kaj la Organizo de la Amerikaj Ŝtatoj, ĝi okazos de la 12-a ĝis la 15-a de julio 1980, en la urbo São Luiz.

VOLTA REDONDA (RJ) - Nia vicprezidanto Inĝeniero D-ro Alberto Flores estas ĝisoste esperantista. Li feris en Caxambu (MG) kaj tie eltrovis du neaktivajn s-anojn. Li tuj interesigis ilin pri la movado. Bonega agado! En ĉi tiu jaro ni devas vekigi ĉiujn geesperantistojn kaj rekruti novajn, kion faras s-ano Flores, instruante Esperanton en Fakultato en Volta Redonda (RJ).

- x - x - x - x - x - x -

OBJETIVOS DE UM CLUBE DE ESPERANTO:

Engenheiro Alberto Flores

CONGREGAR - reunir, agrupar os esperantistas dispersos.

"A UNIÃO FAZ A FORÇA"

CONFRATERNIZAR - os esperantistas. Fazer com que se conheçam e, unidos pelo mesmo ideal, se tornem amigos. O Clube é um ponto de encontro de coidealistas, que passam a formar "unu grandan rodon familian".

APOIAR - as iniciativas dos sócios; ajudar, cooperar, colaborar nos empreendimentos a favor do Esperanto.

ESTIMULAR - novas iniciativas, ações e realizações dos associados e divulgar o que fazem. Aproveitar as idéias e sugestões razoáveis. Inventar novas maneiras de atuar ou de agir.

DESENVOLVER - ou melhorar os conhecimentos linguísticos dos sócios. Dar oportunidades de praticarem o Esperanto, falando, ouvindo, lendo, conversando.

REALIZAR - cursos de Esperanto e Palestras de divulgação do ideal esperantista.

PROPORCIONAR - horas de lazer útil; realizar reuniões em que os sócios possam passar momentos agradáveis, culturais, em

companhia de coidealistas. Desenvolver a sociabilidade dos esperantistas.

FACILITAR - aos sócios adesões a instituições esperantistas.

FACILITAR - aos sócios a leitura de jornais, revistas, livros e folhetos (assinados ou adquiridos pelo clube).

FACILITAR - a compra de livros, a preços baratos. Facilitar a assinatura individual de jornais e revistas em Esperanto.

APROVEITAR - a experiência dos mais antigos, dos mais capazes, dos mais vivos, e contar com o seu apoio ao movimento Esperantista.

INCENTIVAR - os mais novos nas suas iniciativas e nas suas idéias. Estimular e aproveitar o seu dinamismo e entusiasmo, para divulgação do Esperanto e seu ideal de Confraternização.

- x - x - x - x - x - x -

CORREÇÃO

Pelo fato de ter o Conselho Brasileiro de Esperanto, em colaboração com a Cooperativa Cultural dos Esperantistas, promovido o 1º Congresso Internacional de Esperanto (o Latino Americano), denominou-se "nacional" o 1º congresso do Conselho a realizar-se no Brasil, o que não está correto, pois que muitos congressos já aconteceram aqui. Assim, consideremos como "1º Congresso do Conselho Brasileiro de Esperanto" o que está promovido para Juiz de Fora (MG).

- x - x - x - x - x - x -

SÃO PAULO (SP) - San-Paŭlo Esperanto-Asocio estas unu el la plej fortaj organizaĵoj, havanta propran sidejon, librovendejon, kursojn lokajn kaj per korespondado. Ĝia prezidantino kunlaboras kun "Diário Popular", elstaro gazeto de São Paulo. Ŝi estas la konata kaj estimata Elvira Fontes, kiu kun granda sindediĉo laboradas por la Esperanto-movado sur ĉiuj kampoj. Ŝi verkas, instruas, organizas regionajn renkontiĝojn, malgraŭ sia nekompleta sanstato.

Estas eble al sam-ino Fontes realigi tiom da taskoj ĉar pluraj gesamideanoj kunlaboras kun ŝi laŭ siaj eblecoj. Inter ili elstarigas F-ino Francisca Martos, s-ano Nelson Silveira, Deodato Mello, Eurico

Antonio Ribeiro, Walter Francini, Rosa R. da Silva, Waldir Lisboa Rocha kaj aliaj bonaj geesperantistoj.

Ciu lasta sabato de la monatoj s-ano José Dias Pinto gvidas kulturkunvenon altnivelan. La februara kulturkunveno estis dediĉita al la Semajno de Internacia Amikeco. S-ano Deodato Mello aperigis artikolon en "Diário Popular" pri radiamatorismo. Li elstarigis la laboron de nia forpasinta s-ano Luiz Bolivar Fosca, kiu dum multaj jaroj direktis la klubon de la radiamatoroj en San-Paŭlo kaj estis unu el la fondintoj de A.P.E.

S-ano Fosca klopodis konvinkigi la radiamatorojn utiligi Esperanton en Internacia komunikado, ĉar la oftaj neklaraj vortoj (anglaj kaj aliaj) adaptitaj por radiamatorismo fuŝis la interkompreniĝadon, diris s-ano Mello.

La laboro de la kunlaborantoj de APE estas tiel ampleksa, varia, ke ne eblas elstarigi ĉion. Ni prezentas la societon, kiel imitindan ekzemplon.

SOROCABA (SP) - La Sorokaba Esperanto-Klubo de antaŭ kelkaj jaroj eklaboris, vigligis kaj kreskis. Ĝi jam plurfoje organizis regionajn renkontiĝojn, faras propagandon konstante en la "Radio Sorocaba", utiligante Esperanton. En la pasinta januaro ĝi organizis, helpe de la urbestro kaj Turisma Agentejo, la III-an Junularan Renkontiĝon, kun granda sukceso.

La prezidanto de SEK estas s-ano Eluizio B. Rodrigues, kiu ankaŭ reprezentas la Skoltan Ligon. Li senlace klopodas fortigi la movadon en tiu ĉarma urbo.

Nuntempe la anaro de la klubo klopodas diligente aĉeti propran sidejon, ĉar tio faciligas la vivon de la Esperanto-movado. La klubo estas vendanta "brikojn" por ebligi la aĉeton de la sidejo; ĉiu "briko" kostas Cr\$ 250,00. Tiu, kiu povas kaj volas helpi estas bona. La klubo aperigas sian Informan Bultenon akurate.

Se iu volas esti ano de la Skolta Esperanto-Ligo, la kotizo estas 5,00 guldenoj jare, kaj devas sin turni al Eluizio B. Rodrigues, Caixa Postal n^o 234 - CEP 18.100 Sorocaba (SP).

- x - x - x - x - x - x -

PRI LA TRIA JUNULARA RENKONTIĜO ESPERANTA

Ĝi okazis en Sorokaba (SP) de la 23-a

ĝis la 27-a de januaro 1980. Ĝin organizis kaj patronis la BEJO - Brazila Esperanto Junulara Organizo el Sorokaba. Partoprenis ĝin, krom la brazila junularo, la gejunuloj el Urugvajo kaj Argentino. La poŝto eldonis filatelan stampon. Ĉeestis la rendontiĝon du episkopoj: Don J. Lambert Filho kaj Don José Urbais. La gazetoj "Cruzeiro do Sul" kaj "Diário de Sorocaba" kaj la "Radio Sorocaba" disvastigis la eventon. La prezidanto de BEL, Prof-ro Sylla Chaves, donis intervjuon per la radio.

APE de São Paulo estis reprezentita de la prezidantino Elvira Fontes kaj la Brazila Konsilantaro de Esperanto, de Majoro Gilberto A. Silva Velho, nia vicprezidanto. Li ricevis arĝentan plaketon kiel omaĝon pro lia sindediĉo kaj malavara laboro por Esperanto-movado.

Raporto sendita de nia vicprezidanto s-ano Manoel Blaz Garcia. Gratulon al Sorokaba Esperanto-Klubo!

La Junulara renkontiĝo estis apogita de la Komunuma Skretário pri Edukado kaj Kulturo de Sorokaba. La prezidanto de BEJO, s-ano Fabricio Rodrigues Valle, el Gojania (GO), ĉeestis kune kun la anaro de sia organizo, inter kiuj troviĝis Pedro Ramon Sanches kaj aliaj junuloj diligentaj.

CAÇAPAVA (SP) - Nia vicprezidanto Majoro Gilberto A. Silva Velho havas sufiĉe grandan kvanton de materialo por organizi ekspoziciojn. Temas pri esperantaĵoj el 30 landoj. Li faros ekspozicion en Juiz de Fora kaj oni havos eblecon koni tiajn vidindaĵojn. Li ankaŭ faros propagandon pri la utileco de Esperanto, kiel lingvo internacia, kaj certe havos sukceson kiel ĉiam.

Lia bone organizita arkivo havas fotojn el la tuta lando, gazetojn kaj aliajn informilojn, kiujn li zorge kolektis. La pasintan jaron li faris ekspoziciojn en la sekvantaj urboj: São Miguel Paulista, Promissão, Natal kaj Uberaba. Vojaĝante, li en ĉiuj urboj kontaktas la esperantistojn kaj tre diligente "Semas kaj semas, neniam laciĝas". Gratulon, s-ano Silva Velho! La arĝentan plaketon vi meritas kune kun nia amikeco kaj admiro.

RIO CLARO (SP) - Okazis en tiu progresema urbo unu el la regionaj renkontiĝoj, kiun organizis la sanpaŭla esperanto so-

cieto. S-ano Ademar N. Alves kune kun grupeto klopodas disvastigi Esperanton. Li eldonis propagandilon pri la internacia ligo - "Esperanto-Lumo" pere de kiu li donas klarigojn pri nia movado.

CAVALCANTE (GO) - TEKNIKA VORTARO - kun la celo iam publikigi kiel eble plej kompletan vortaron Portugal-*Esperanto-Portugalan* ni serĉas fakulojn, kiuj pretas traduki em la portugalan lingvon vortlistojn prenitajn el PIV pri ĉiuj fakoj. Skribu al Carlos Lima Melo, Posto de Saúde - 77.265 - Cavalcante (GO), Brazilo, kaj petu la vortliston de via fako. Li sendos ĝin al vi kondiĉe, ke vi estu preta kunlabori en la tradukado. Estas konsilinde, ke la kunlaboranto posedu PIV (Plenan Ilustritan Vortaron) kaj almenaŭ unu fakan vortaron portugallingvan por kontrolado. La vortlistoj pri ĉiuj fakoj jam estas pretaj kaj nur atendas vian reason, mia kara amiko. Fakuloj, vekigu!

LAVRAS (MG) - La gazeto "Tribuna de Lavras" aperigis artikolon pri Esperanto kaj pri la Semajno de Amikeco. En la ejo "Loja Maçônica" aperis la esperanta karnavala grupo "Ludovikidoj". Okazis ŝaka ĉampioneco "Internacia Amikeco" organizita de la Ŝaka Esperanto-Klubo. Estis solena fermo de la Semajno de la Internacia Amikeco en la salono de la lernejo "Nossa Senhora Aparecida", kun religia diservo kaj kanto en Esperanto. La meson celebris, pastro Sergio.

La Esperanto-Klubo el Lavras eldonis propagandilon kun elstara frazo: "Havigu milionojn da geamikoj"! Pri la organizado de la "Ludovikidoj" zorgis nia vicprezidanto Luiz Teixeira da Silva, unu el la fondintoj de BKE.

Okaze de la UK en la venonta jaro, la Ŝako-Esperanto-Klubo organizos la II-an Internacian Esperantan ŝakfestivalon.

SALVADOR (BA) - Laŭ la informoj ricevitaj (neoficialaj) la Postkongreso de UEA okazos parte en Salvador.

La aviadila kompanio planas plurtagajn vojaĝojn al tiu historia kaj pitoreska urbo. Certe la kongresanoj ĝuos agrablajn tagojn en nia fama ŝtato Bahia.

RECIFE (PE) - Kun granda intereso ni

legis la raporton de la Pernambuka Esperanto-Asocio, senditan de nia vicprezidanto Amaro Pinangé Soares. Laŭ tiu dokumento oni vidas, ke tiu organizaĵo estas unu el la plej elstaraj de nia lando.

Ne havante informojn, ni eksciis malmulton pri tiu societo, kies prezidato, estas la bone konata kaj estimata Mag. J. M. Mabezoone. Ĝi estas unu niaj konsistigantoj, kiuj rekonis la laboron de nia Konsilantaro kaj decidis partopreni la aron de la societoj, kiuj ĝin konsistigas.

Tiu organizaĵo havas pli ol 150 anojn, bonan bibliotekon, librovendejon kaj diversajn kursojn: elementan, daŭrigan kaj superan. Ĉiujaŭde okazas kunveno por praktikadi konversacion. Ĝi funkcias elementan kurson en la Spiritisma Federacio de Pernambuko en Embratel kaj en la "Academia Garanhense de Letras", en la urbo Garanhuns. Ĝi havas informan bultenon, regule disdonita senpage.

Ĉiusemajne okazas lunĉo en la sidejo de la societo kaj la anaro sindone kunlaboras, ĉar nur malavara laboro fortigas la movadon.

Ni sincere gratulas al niaj gesamideanoj el Pernambuko pro ilia sukceso kaj deziras al ĉiuj daŭran progreson. La elektita direktoraro de la organizaĵo estas: Prezidanto: - J. M. Mabezoone; Vicprezidanto: - Geraldo Pires Sitonio; ĝenerala sekretario: - Amaro Pinangé Soares; dua sekretario: - João José Lima Costa; kasisto: - Maria José Pontes; dua kasisto: - Raimundo Ferreira Andrade; bibliotekisto: - Jorge Luiz de Oliveira Melo. Konsilantoj: - Arnon Ribeiro Vasconcelos kaj Amilcar de Souza Leão.

ILHEUS (BA) - La prezidanto de la Ilheus Esperanto-Grupo, s-ano Eleus Leonardo de Sá informas nin, ke en la jaro 1981 - a Ilheus festos sian centjaran datrevenon.

S-ano Eleus planas, en la kadro de tiu grava dato, organizi esperantan konvencion por festi la datrevenon de tiu fama urbo. La konvencio estas antaŭvidita por la 29-a de marto ĝis la 5-a de aprilo, 1981.

Tiu nia vicprezidanto ne laciĝas, ĉiam propagandas pri la internacia lingvo kaj gvidas kursojn.

CURITIBA (PR) - La Esperanto-Societo el Curitiba aperigas propagandilon pri la internacia idiomo: "Você fala Esperanto?"

Pere de tiu frazo ĝi propagandas pri Esperanto kaj donas klarigojn pri ĝia, utileco. Imitinda ekzemplo.

BRAZILA ESPERANTO - LIGO - Rio de Janeiro (RJ) - Ni ricevis informon kaj specimenojn pri kanzonoj "Karnavalo en Rio" verkitajn de la poeto Sylla Chaves, prezidanto de BEL. Li ankaŭ pri-zorgos la eldonon de la kanzonoj en portugala lingvo, kaj Esperanto. Li informas nin, ke la kanzonojn gravuros la "SONO-VISO" en diskojn, en ambaŭ lingvoj. La marŝoj estas taŭgaj por la karnavalaj baloj.

Interesatoj volu sin turni al BEL, Rio de Janeiro (RJ) - Praça da República, 54-2º - CEP 20.211. Ni ricevis ankaŭ libro-katalogon pri libroj vendataj de BEL. **SEMAJNO DE LA INTERNACIA AMIKECO.**

Ni dankas kaj recipokas la ricevitajn salutojn. Ni esperas, ke tiu kampanjo fariĝos ĉiam pli kaj pli forta por ke ekestu en praktiko ĝia bela devizo: "Amiko faras la monson pli bona". - La estraro de BKE.

1 - A KONGRESO DE BKE

Enskribiĝis ĝis nun (fino de februaro) la jenaj gesamideanoj:

40 - Gilca Silva Velho; 41 - Antonio de Souza Barbosa; 42 - Verina Cardoso Barbosa; 43 - Lair Alves Moreira; 44 - Luiz A. de Coelho; 45 - Lourenço Sogabe; 46 - Mauro Libano da Fonseca; 47 - Elpidio de Menezes; 48 - Lauro J. Oliveira; 49 - João de Oliveira Gama.

- x - x - x - x - x - x -

SEKSO KAJ EGALECO

Aperis la unua numero de tiu informilo. Ĝia Redaktoro estas F-ino Anna Brennan, en Nederlando, p/a Nieuwe Binnenweg 197-B, 3021-Rotterdam. La informilo traktas la diskriminacion, kio ja estas temo de la 65-a UK en Stokholmo. Ni sugestas la abonon de la periodaĵo, ĉar ĝi pritraktas la intereson de la virinoj ĝenerale. La abonkosto por unu jaro estas dek internaciaj respondkuponoj, sendebla al la redaktoro.

MONO RICEVITA

De la jenaj gesamideanoj ni danke ricevis la subajn sumojn por nia Bulteno:

Nelson Silveira	250,00
Arnon R. Vasconcelos	100,00

Amaro Pinangé Soares	165,00
Antonieta Almada Miranda	400,00
Luiz A. P. Menechino	300,00
Promissão Espto. Asocio	200,00
Jaddo Couto Maciel	100,00
F. S. Almada (libroj)	650,00
Francisca Martos	500,00
Modesto Belmonte de Abreu	500,00
Claudio Zimmermann	150,00
Maria José Pontes	100,00
Eleus Leonardo de Sá	200,00

GRAVA SCIIGO

Ni petas al tiuj, kiuj volas partopreni nian kongreson sendu ĉekon aŭ poŝtmandaton pageblajn en Juiz de Fora, en la nomo de Marija Pozder Almada, laŭ la adreso: - Rua Santo Antonio, 1087, apto. 602 - Edifício "IPANEMA" - JUIZ DE FORA (MG) - CEP - 36.100 - Dankon. Faru tion post la ricevo de nia Bulteno 52, t. e. 10-a de marto.

- x - x - x - x - x - x -

KAMPANJO DE BKE

Al jenaj novaliĝintoj, koran dankon!

1 - Banco Reginal de Brasília	10.000,-
2 - Decio Estrela Maia (x)	1.000,-
3 - Modesto B. de Abreu	10.000,-
4 - Godofredo A. Goes (x)	1.000,-
5 - João Oliveira Gama (x)	2.000,-
6 - Lair Alves Moreira (x)	500,-

(x) Per Kotizoj.

- x - x - x - x - x - x -

LIGVA PRIKOMENTO

D.W. - Argentino

"Tiun agon li rigardis sia devo". En tiu ĉi frazo la vorto "sia" estas ĝusta. Oni povas diri ankaŭ jene: "kiel sian devon".

Kion signifas la vorto "Rodano"? Estas la esperanta nomo de la rivero Rhône en Francujo. - Ispografio = la nomo de la stenografia sistemo farita de la amerika esperantisto F. A. Hamann. - "La infanoj devas sendi ateston subskribita de la gepatroj". - La vorto "subskribita" ne estas ĝusta. Korekte: "subskribitan", ĉar ĉi tiu vorto rilatas al la vorto "ateston" kaj pro tio devas havi la saman gramatikan formon. En la jaro 1210 la migrado komencis. Korekte: "komenciĝis". La vorto "komenci" kaj "fini" estas transitivaj verboj. "La kurso komenciĝis

kaj post tri monatoj finiĝis". "Pos la tria leciono la kurso komencis (ne homenciĝis) esti malfacila". "Kiel premio mi deziras la signitan libron". Ĉi tiu frazo volas kredigi, ke la parolanto mem estas premio (mi, kiel premio, deziras . . .) Por havi taŭgan frazon, oni devas diri "kiel premio". Bone estas diri: "Kiel esperantisto mi deziras paroli nur esperante". Sed "Kiel esperantiston oni min elektis." Memorindaj estas la vortoj de D-ro Edmond Privat: "Estas granda eraro imagi, ke la riĉeco de naciaj lingvoj konsistas el la malsimpleco aŭ senordeco de ilia gramatika fundamento. Tute ne. Ĝi konsistas el la abundeco de sinonimoj kaj generaligitaj bildoj, kio estas tute alia afero. Renverse estas simila iluzio kredi, ke "nepre" la riĉiĝo de Esperanto je sinonimoj kaj bildoj igos ĝian Fundamenton baldaŭ tiom malsimpla kaj senorda kiel tiu de nacia lingvo. Kial? Neniu fakto pravigas tian supraĵan konkludon. Ĉu "ega" ŝanĝis la fundamentan rolon de "eg"? Tamen "granda" ricevis utilan sinonimon. (Daŭrigota).

- x - x - x - x - x - x -

JUNDIAÍ (SP) - Ŝajnas, ke en tiu bela urbo fortiĝas la Esperanto-movado. La novelektita direktoraro de la Jundiaí Esperanta Grupo, organizis tuj Esperanto-kurson. Junuloj el tiu urbo vizitis la redakcion de nia I. Bulteno, aĉetis la lernolibron "Esperanto Elementar". - Inter ili troviĝis iu oficisto de Volks Wagen, kiu jam vendis plurajn librojn de F. S. Almada por interesatoj de la sama Kompanio.

SERRA NEGRA (SP) - En januaro paŝinta estis fondita en tiu urbo la Serra Negra Esperanto - Grupo kaj samtempe elektita ĝia prezidanto, s-ano Antonio Augusto Antunes Júnior. Dum la inaŭgura festo parolis profesorino Elvira Fontes, prezidantino de APE. Ni deziras sukceson al novbakita grupo. Jen ĝia estraro: Prezidanto: Antonio A. Antunes Junior; vicprezidanto: - João M. Sargento; sekretario: - Letícia Gloria Valente; kasisto: - Edméia Guidalini; - Kontrola komitato: - Adaude Gloria de Almeida, d-ro José Higino dos Santos kaj Cleide Correia.

- x - x - x - x - x - x -

ESPLORANTE LA VORTARON - Nº 1

Nelson Pereira de Souza

Okaze de lia vizito al Brazilio, mi petis de D-ro Støp-Bowitz lian opinion interalie pri la brazila movado. Kompreneble li tre afable laŭdis nian laboron, sed li rimarkigis unu aferon. Li diris al mi pli-malpli tion: la brazilaj esperantistoj devas internaciigi sian Esperanton, t.e. ni uzas kelkajn netaŭgajn esprimojn, kiuj ne ĝuste sonas laŭ la internacia signifo.

Mi mem ĵus spertis pri tio. Transskribante al UEA protokolon de LKK-kunsido, mi menciis koncerne al la solenaĵo, kiu devos okazi en Stokholmo por la flago-transpreno, ke estas "neoportune fari tion". Mi ja volis nur diri, kiel traduko de nia "ĉe inoportuno trakti diso": "ni ne povas nun fari ion pri ĝi", sed por ili ĝi havis signifon: "ni ne volas fari ĝin". Vidu la grandegan diferencon! Kaj ni ja volas . . . Kelkaj jam sopiras por partopreni tiun belan solenaĵon!

Tre konata kaj inter ni malbone uzata vorto estas: "priokupiĝi", kiu en E signifas "okupar-se de" kaj en portugala lingvo estas uzata kun la senco "zorgi" aŭ simple "pensi pri". Alia "danĝera" portugallingvaĵo estas "comum", ĉar "komuna" signifas "de todos", kiel "komuna manĝejo", "komuna lingvo". Sed se ni diras "komuna virino"! . . . Eble ni volas diri simple "ordinara virino", kio en E tute ne havas malbonan aŭ fian secon, ĉar "ordinária, sem vergonha" estas "nebona, nenobla"; kaj se temas pri "coisa ordinária" devas esti "senvalora objekto".

Foje iu skribis al A.E.R.J. (Associação Esperantista do Rio de Janeiro): "la ĵurnalo haltis je rondo". Ĉu vi povas kompreni? Li volis diri "o jornal parou de circular", kio devas esti en E: "la ĵurnalo (eble la gazeto) ĉesis aperi". Li serĉis en la vortaro "parou, trovis "halt-is", kaj "circular", trovis "ronda", intermetis la ĝeneralan prepozicion "je", kaj solvis la problemon!

Mi ofte diskutas pri tio kun nia klera s-ano D-ro Lima Mello. Ĉu estas aliaj interesataj pri ĝi? Bonvolu skribi al mi, ĉar mi bezonas tianj ekzemplojn por miaj lecionoj en kursoj por progresintoj. Ankaŭ mi povos enmeti ilin en aliaj artikoloj, kaj eventuale ni povas eĉ fari specialan debaton dum la 1^a Kongreso de B.K.E., en Juiz de Fora.

PRÊMIO NOBEL DA PAZ PARA FRANCISCO CÂNDIDO XAVIER

Está sendo empreendida no momento em todo o Brasil e em mais de 50 países das cinco partes do mundo uma campanha visando a concessão do Prêmio Nobel da Paz ao médium patricio Francisco Cândido Xavier. Em nome do Conselho Brasileiro de Esperanto nosso secretário geral, Nelson Pereira de Souza enviou telegrama de apóio à campanha.

JUIZ DE FORA (MG) - Kunlabore kun nia kongreso okazonta en tiu urbo, informas nin Reinaldo Jorge Zaghetto, sekretario de la kongreso, ke estis starigita kurso por prepari geesperantistojn por la evento, krom la ekzistantaj. La kurson gvidas la prezidanto de KEA - Kultura Esperanto-Asocio, Orlando Lopes Junior, S-ino Weima Watson Renault, 2-a sekretario, kaj Reinaldo Jorge Zaghetto, 1-a sekretario de la kongreso. Ĝi okasas de la 18-a ĝis la 19-a horo ĉiutage.

HOTÉIS:

Joalpa Hotel — Esq. Av. Rio Branco x Getúlio Vargas - Preços: Standard "B" - Solteiro: Cr\$ 460,00; casal ou duplo: Cr\$ 575,00; Triplo: Cr\$ 835,00; Luxo: Cr\$ 635,00; casal ou duplo: Cr\$ 750,00; triplo: Cr\$ 1.005,00; Super luxo: Cr\$ 750,00; casal ou duplo: Cr\$ 860,00 e triplo: Cr\$ 1.120,00. **Preço fixo.** Telefone: 211-6055 — DDD 0132.

Hotel Novo Rio — Av. Rio Branco, 1830 — Casal: Cr\$ 210,00; Solteiro: Cr\$ 70,00. Modesto. Com possibilidade de aumento da diária.

Imperial Hotel — Rua Batista de Oliveira, 605 — Tel.: 2-7375, 2-4441, 2-7350. Apto. solteiro: Cr\$ 300,00; duplo ou casal: Cr\$ 500,00; quarto solteiro: Cr\$ 180,00; casal ou duplo: Cr\$ 300,00 - com possibilidade de aumento.

Rocha Hotel Ltda. — Rua Mal. Deodoro, 557, esq. com Av. Rio Branco — Solteiro: Cr\$ 300,00; casal ou duplo: Cr\$ 500,00; suíte: Cr\$ 900,00; Quarto solteiro: Cr\$ 190,00. Telefone: PBX 032 - 212-7500 — Sujeito a alteração no preço.

NOTA: Todos os hotéis se encontram próximos da Estação Rodoviária e da Reitoria. As refeições serão servidas no restaurante da Reitoria por preços módicos. Estamos providenciando alojamento gratuito, o que comunicaremos oportunamente. Há muitos outros hotéis localizados um pouco mais distantes ou mais caros, embora próximos da Reitoria.

ALÍGIO

KOTIZOJ

Plenkreskuloj	Cr\$ 400,00
Akompananto (edzino)	Cr\$ 300,00
Junulo (ĝis 25-jara)	Cr\$ 100,00

Aliĝanto:

Adreso:

Urbo: CPF: Ŝtato:

Akompananto:

Rimarko: Utiligu ĉi tiun parton de la Bulteno, ĝin sendante kune kun la ĉeko, poŝtmandato aŭ alimaniere. La kvitancon de la sendita mono ni faros per bulteno, surlistigante la nomojn de la enskribintoj.